

N. N. 32,

Jen ĉiamviva Rozo

*tradukita de Leland Bryant  
Ross*

Jen ĉiamviva Rozo  
laŭ vorto de profet'  
El la Jiŝaja ŝoso  
ekkreskis kun impet'.  
Ĝi venis, hela Flor',  
en frida tempo vintra  
Je noktomeza hor'.

Jesaja ĝin anoncis,  
la menciita Flor';  
Maria ĝin responsis  
el patrin-ama kor'.  
Ŝi naskis Rozon por  
klarigi Dian amon  
Je noktomeza hor'.

Ĉi tiu milda Floro  
per sia dolĉ-arom'  
Heligas per Digloro  
la vojon de la hom'.  
Ja homo, tamen Di',  
ĝi ŝarĝojn malpezigas  
Kaj homojn savas ĝi.

...

N. N. 32,

Elkreskis  
branĉeto*tradukita de Joachim Gießner*

1. Elkreskis rozbranĉeto  
el rozarbust' de Di'.  
Aŭguro de profeto  
rakontis jam pri ĝi.  
Naskiĝis rozfloreto  
meze en vintra nokto  
laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu rozo -  
Jesaj' prognozis ĝin -  
el sia korpo sproson  
Mari' la virgulin'.  
Laŭ dipotenca vol'  
ŝi naskis Di-infanon  
por tuta mond' konsol'.

3. Kaj tiu belfloreto  
tre hele lumas ĝi.  
Obskuron la brileto  
forprenas nun de ni.  
Vi hom' kaj vera Di'  
el pekoj kaj suferoj  
estas savant' por ni.

...

N. N. 32,

roz- Rozbranĉo forĝermadis

*tradukita de Felix Ney*

Rozbranĉo forĝermadis  
el trunk' de nobelec'.  
Prauloj jam kantadis:  
de Jiŝaj ĝia spec'.  
Floreton portis ĝi,  
en akra vintro estis,  
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita  
Jesaja de profet':  
Maria netuŝita,  
de kiu la floreto'.  
Eterne volis Di':  
naskinta infaneton  
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro  
alvenas bonodor'  
Ĝi brilas en la koro,  
mallumon pelas for.  
Homido, Dia Vort',  
nin el sufero helpas,  
De pek' Savant' kaj mort'.

...

Traduko de la Germana poemo  
 “Es ist ein Ros entsprungen”  
 de N. N. 32 en Esperanton de  
 LELAND BRYANT ROSS (Ros’  
 Haruo).

Arg-618-1247 (2014-09-08  
 13:06:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en  
<http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamu1.html>.  
 Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub  
[http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros\\_h.html](http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html). Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon  
<https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.

Traduko de la Germana poemo  
 “Es ist ein Ros entsprungen” de  
 N. N. 32 en Esperanton de JOA-  
 CHIM GIESSNER (\*1913-12-23 –  
 †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18  
 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en  
<http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub  
<http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo  
<http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancx1.html>.